# Informilo

verz. 16/1 9
ontv 26/1 9

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 3 N° 8 DEC. 1983

NOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONENOTUBONE

VENONTA ESTRARKUNSIDO : 14 10 1984 EN ANTWERPEN

VENONTA KUNSIDO DE LA JUBILEA KOMISIONO : 21 01 1984 EN BRUSELO, "CAFE LE PASSAGE, AV. MARNIX 12

---

KUNLABORO ESTAS PETATA RILATE AL VERKADO DE TEKSTOJ POR NIA KOLOKVO OKAZE DE NIA VENONTJARA KONGRESO EN AALST.

TEMO : " KIEL ELIRI EL NIA NUNTEMPA STAGNADO
KIUJ ESTAS LA PSIKOLOGIAJ MOTIVOJ POR KONVIKI
PRI ESPERANTO "

---

La redaktoro kaj la estraro de FEL prezentas al ĉiuj vi kaj al viaj karaj siajn plej sincerajn dezirojn pri

p a c o   a m i k e c o   p r o s p e r o   s a n o

por la venonta kaj sekvontaj jaroj.

---

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



## P R O T O K O L O

pri la estrar- kaj Limburga ĝenerala provinca kunsidoj de sabato 03 12 1983 en Hasselt.

I. ESTRARKUNSIDO DE FEL.

Ĉeestas : P-ro A. Beckers (AB), Erik D'Hondt (ED), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES), André Staes (AS), Kristin Tytgat (KT), Hilde Vaningelgem (HVI), Jan Bovendeerd (JB).

Petis senkulpigon : Trees Dooms, Roland Rotsaert kaj Jules Verstraeten.

Komenco : 10.30 h.

T A G O R D O

1. Protokolo pri la estrarkunsido de 29 10 83 :
   Punkto 5.2.1. : Kontraŭe al tio kio estas indikita, la venontjara kongreso okazos je 31.08, 01 kaj 02 09 1984.
   Por la cetero, la protokolo estas aprobita.

2. Raportado pri plenumitaj taskoj.

2.1. JB - petis al UEA kaj Heroldo de Esperanto publikigi nian intencon okazigi kolokvon en la venontjara kongreso en Aalst kaj alvoki al kunlaboro per verkado kaj ensendo de tekstoj rilate al la temoj :
"Kiel eliri el la stagnado kiun ni nun spertas"
" Kiuj estas la psikologiaj motivoj por konvinki pri Esperanto".
- petis al R. de Roover pri la verkado de "La vivo de Zamenhof" en la serio "Historische Verhalen" de "De Sikkel".

2.2. HVI La balo de 05 11 1983 estis tre sukcesa, sed - laŭ PP - deficita.

2.3. PP - Nova fasko da folioj de la "Manlibro por aktivuloj.." aperis. Estas 35-o da abonantoj, el kiuj kelkaj el Nederlando kaj Valonio.
- Parolante pri monrimedoj, PP prezentas "festkandelojn". Tri specoj da ili, po 20,-, 50,- kaj 100,- BF-aj haveblaj en Esperantocentro Antverpeno. La kandeloj estas bonkvalitaj. Ekz. la po 100,- frankaj eltenas pli ol 3 tagojn kaj noktojn.

2.4. ES - daŭre estas okupata pri la Monda Kongreso pri Aplikata Lingvistiko kiu okazos venontan aŭguston en Bruselo. Li jam alskribis diversajn personojn cele al kunlaborado, sed ankoraŭ ne spertis sukceson.
- disponas pri pluraj tekstoj, inter kiuj la "Pedagogia valoro de E°" el kiuj estu elektitaj la plej taŭgaj por lanĉi kampanjon.
- opinias ke nun estas favora momento pro la ekzisto de oficiala speci-

ala komisiono pri la studado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.
En tiu rilato li atendas bonan kunlaboron de S-ro W. Kuypers.

- proponas por 84-85 okazigon de informkampanjo pere de libro eldonota de AIMAV (Genta Universitato). Temas pri nacilingva informlibro por universitat-nivela publiko.
Li klopodos fari la samon en Mons, kie nun jam ekzistas kunlaboro kun Esperanto-Centro Paderborn.

3. Financoj (PP k. ED)

3.1. La buĝeto por 1984 estas en ekvilibro. Verŝajne ankaŭ tiu por 1983.

3.2. Okaze de speciala kunsideto la financa komisiono ellaboris koputilan programon pere de kiu estas eble daŭre havi klaran superrigardon super la financa situacio kaj ĝia evoluo. Ili ankaŭ ellaboris analizan librotenadon por daŭre havi ekzaktan situacion.

3.3. Rilate al la konstato de la pasinta kunsido pri la altaj elektrokostoj, PP klopodos eltrovi ĉu ne estas ia difekto kiu kaŭzus eventualan energiperdon. Komprenble la maŝinaro foruzas multon. Same la lifto. Li cetere atentigas la interesitoj ke la lifto estu kiel eble plej malmulte uzata.

3.4. La membronombro malpliiĝis je ± 150 unuoj, dum la abonantaro plialtiĝis je proksimume 80 unuoj.Sekve al speciala cirkulero, sendita al 100 malnovaj membroj, remembriĝis 12.

3.5. La librovendado kontentige evoluas, parte danke'al nia mendilo-aliĝilo.

4. Jubilea Jaro

Raportas JB kaj AS pri la unua kunsido de la "Jubilea Komisiono" en Bruselo je 19 11 1983.

4.1. Unua realigo estas la starigo de "KLUBO 100". Ni malfermis konton ĉe ASLK. Ni atendas la kontnumeron.
Temas pri fakta organizo portempa cele al la financado de la jubilea programo. Membriĝo eblas per pago de unufoja kotizo de BF 1.000,- kiu rajtigas je : - partopreno en ĉiuj kunsidoj de la komisiono
- fari proponojn kaj sugestojn
- voĉdonado pri la decidoj.

4.2. Poŝtmarko.
Proponiĝis klopodi eldonigi poŝtmarkon en diversaj landoj kun la sama simbolo.

4.3. Radiostacioj
Substrekata estas la valoro de la lokaj radiostacioj.
La lokaj grupoj estas alvokataj regule sendi siajn programon kaj komunikojn



al ili. Jam pruviĝis ke ili ne kontraŭstaras tion. Male jam evidentiĝis ke fakte ili "ĉasas" novaĵojn. Ni profitu el tio.

4.4. Ekzamenkomisiono.
Decidita estas kunmeti ekzamenkomisionon baz- kaj mezgradan por permesi al tiuj kiuj deziras diplomon akiri tiun.
En la sino de la komisiono jam proponiĝis tri personoj por partopreni en tiu ekzamenkomisiono, nome Marc Demonty, Emile Van DAmme kaj Ivo Durwael.
AS jam kontaktis ilin por la realigo.
En la komisiono interkonsentiĝis preni kiel bazon por la ekzamenoj, la regularon de la UEA-ekzamenkomisiono kiel ankaŭ la UEA-diplomon, se tia ekzistas.

AS opinias, ke kadre de FEL pli bone estus unue aktivigi la kursgvidantojn al kunlaboro. Li jam petis kelkajn kursgvidantojn havigi al li siajn ekzamenojn por kompari kaj elekti taŭgajn elementojn por kunmeti ekzamenprogramon kun la komisionanoj.
Dua paŝo povus esti organizi la ekzamenojn kadre de la de UEA organizitaj ekzamenoj.

JB jam skribis al UEA por peti la regularon kaj diplommodelon.

4.5. Bibliotekoj.
AS opinias ke ni instigu bibliotekojn meti en sian bretaron Esperanto-lernolibrojn kaj listigi ilin en aparta katalogo.
PP atentigas pri tio ke ekzistas katalogo pri Esperantoverkoj en la diversaj lokaj bibliotekoj, kiu pro financaj kialoj ne ankoraŭ estas eldonita.
Ankaŭ ES opinias tra grave disponi pri listo pri lerniloj.

4.6. Honora Komitato - Patrona Komitato.
En sia broŝuro "Kiu faru kion ?", UEA insistas pri la starigo de tiaj komitatoj. Pli bone tamen estas atendi ĝis post la elektoj en 1985.
Por la jubilea jaro mem sur monda nivelo envenis ĉe UEA du proponoj : unu el Hispanio (la reĝo) kaj unu el Jugoslavio.

5. Movada situacio (niaj homfortoj - listoj)

PP anoncas ke jam estas haveblaj laŭprofesiaj listoj. Li planas ankaŭ enmeti en la komputila programo la funkciojn en la Esperanto-movado.
Pri la aĝoindiko li konstatis ke granda nombro da membroj ne indikas sian aĝon. Kial ?? Eĉ 36 % tion ne faras. Li opinias ke la grupaj kasistoj povus helpi en tio.
La afero estas grava en tiu senco ke tiamaniere ni povas konstati en kiu aĝogrupo estas plej multe da membroj kaj kie ni devas speciale atenti.

6. Gazetara Rebatservo.

Nia Gazetara rebatservo ŝajne ne funkcias.
AS estas en rilato kun G. Pirlot por organizi kunvenon de interesitoj cele al pristudado de la eblecoj, devoj ktp.
Proponiĝas antaŭe dissendi cirkuleron redaktitan de ES kaj kunvoki poste la respondintojn.
JB dissendos tiun enketilon kune kun INFORMILO.
La temo estu remetota en la tagordon de la venonta kunsido.

7. INFORMILO- ESPERANTO PANAORAMA.

JB atentigas pri noto kiun li antaŭ kelkaj monatoj ricevis de PP kaj en kiu estis proponite ke la redaktoro de Esperanto Panorama trakribus la protokolojn de la estrarkunsidoj por resume raporti en Esperanto Panorama. Tio fakte okazis nur unu fojon.
PP raportas ke Anne Tilmont ne plu redaktas la bultenon kaj ke li mem denove devos tion fari. Li atentos pri la ebla informado pri la estrar-laboroj pere de Esperanto Panorama.

PP havas alian proponon, nome duobligi la flavajn paĝojn en Esperanto Panorama kaj disponigi ilin al la lokaj grupoj por siaj komunikoj aliaj ol la nuraj mencioj pri la aktivecprogramoj. Li proponas tion fari provizore dum unu jaro kaj decidi pri eventuala daŭrigo fine de la venonta jaro. Unuanima konsento.

PP plie proponas sendi, almenaŭ unu fojon, Esperanto Panorama-n al ĉiuj konataj eksmembroj cele al remembriĝo.

8. Diversaĵoj.

8.1. GENTA KLUBO petis esti forstrekita el la listo de lokaj grupoj pro tro malgranda membronombro kaj konsideri tiujn membrojn kiel inviduajn membrojn de FEL.

8.2. ES insistas pri disponigeblo de specialaj, fakaj informiloj.

8.3. ES same insistas pri bona preparo de nia venontmarta ĝenerala kunsido kaj reelektado.
JB raportas ke la personoj kiuj ricevis la plej altan kvoton en la Lovena kongreso rifuzis kandidatiĝi (krom unu). Li proponas fari novan referendumon perletere pere de la grupaj respondeculoj.

8.4. UEA ĉefdelegito insistis pri indiko de JD = Juna Delegito. KT estas preta informiĝi inter la junuloj sed konstatas ke jam estas tro malfrue por sukcese tion realigi.

8.5. AB anoncas ke li havas kontaktojn kun la Blankaj Patruloj en Kigali. Ili estus favoraj al Esperanto. ES, kiu kreis kernon en Rwanda, preferus ke la unua kontakto estu farita de la lokaj reprezentantoj. AB havigos la adreson al ES.

8.6. La venonta estrarkunsido okazos je 14 01 1984.

Fino : 12.50 h  JB



II. Limburga Ĝenerala Provinca kunveno.

Ĉeestas : - krom la FEL-estraranoj (vidu p. 3)
P-ro A. Beckers, Jozef Christiaens, Albert Claesen, Guido Claesen, Edgar Jamar, Guido Schroeyers.

Komenco : 14.45 h.

Ĝenerala rimarko : La kunsido estas el la plej interesaj, la diskutoj viglaj kaj senchavaj, la etoso agrabla. Dank'al ĉio tio, la malmultnombra partopreno ne sentiĝas

Post la bonvenigo de la prezidanto, tuj ekas vigla diskuto.
A. Claesen bedaŭras la malmultnombro da ĉeestantoj, sed atentigas ke ĝuste tiun ĉi tagon multege okazas en Hasselt. Ekz. la Kultura Centro estis komplete okupata de diversaj organizoj.
G. Schroeyers raportas ke en Limburgo fakte estas nur du grupoj : Hasselt kaj Beringen.
A. Claesen havas problemon : tiun de la post-komenca kurso. La lernantoj scivolas pri kio estas farebla post la baza kurso, ĉu ili povos daŭrigi ktp. AC ne sentas sin kapabla gvidi progresigan kurson. AS opinias ke jes.

Rilate la jubilean jaron, JB proponas pripensi ĉiujn eblajn realigeblaĵojn. Li opinias ke unu el la unuaj agadoj - kiuj daŭru la tutan preparperiodon - estas kiel eble plej plilarĝigi la bazon, pligrandigi la membraron. Bonege estus ekz. se en 1987 ni povus diri ke nia membraro duobliĝis. Li vidas eblecon por tio en tri partoj : -varbi novajn membrojn (pere de kursoj)
-ne perdi tiujn membrojn (per la kvalito de la grupaj programoj)
- retrovi malnovajn membrojn (eventuale pere de persona kontakto).
Laŭ Alb. Claesen la problemo ne troviĝas en la varbado, sed en la ne-perdo de la varbitoj. Li mem ne emas nur varbi, sed precipe labori por daŭraj membroj, por tiuj kiuj efektive lernas la lingvon, do.
ES opinias tamen, ke ni ankaŭ bezonas apogantojn, amikojn de Esperanto, homojn kiuj eble ne (plu) pretas lerni la lingvon, sed jes volas subteni ĝin. Ili estas necesaj por pligrandigi la premon sur la oficialuloj por enirigi Esperanton en la lernejojn, ekzemple.

A. Claesen demandas ĉu FEL ne pli bone prilaborus librovendejojn por la vendado de niaj libroj anstataŭ havi propran libroservon.
ES opinias ke tio ne ankoraŭ estas ebla. Cetere la librovendejoj ne estas interesaj. Jam estas tro da ili. Ni ankaŭ ne forgesu ke por vendistoj valoras nur la profito . Ili ja estas komercistoj. Jes interese estus prilabori la distribuantojn. Ilin ni devas kiel eble plej bone informi.

La diskuto iom post iom revenas al la membraro. La lastjaraj konstatoj estas ke ni perdas membrojn, ke la movado stagnas. Jen grava priokupado de la estraranoj.

Denove estas insiste alvokata al pripensado de la problemo, al kunlaboro en la planita kolokvo okaze de la venontjara kongreso en Aalst, kies temo estas : " Kiel eliri el la stagnado kiun ni spertas ? Kiuj estas la psikologiaj motivoj por konvinki pri Esperanto ?" Petata estas ke ĉiu interesito surpaperigu siajn ideojn kaj sendi ilin al la sekretario.

G. Shroeyers informiĝas pri la stato de la nova vortaro de F-ino Middelkoop. La "materialo" estas sendita al la kompostisto kaj la kontrakto estas priparolata de la respondeculoj. Ni esperas povi disponi pri la vortaro antaŭ tro longe.

Por fini PP lanĉas la "festkandelojn" de FEL kaj vendas jam la alportitan kvanton.

Post dankvorto de la prezidanto, la kunsido finiĝas je 14.15 h.

JB

---------------------------

KOMUNIKOJ.

Senpagaj materialoj pri komunikado.

1983 estas la "Monda Komunika Jaro". Ĝi estas samtempe la unua jaro de la kvin-jara laboro por festado de la jubileo de Esperanto. La ligiteco inter la internacia lingvo kaj komunikado estis reliefigita de la ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, R.E. Butler, okaze de la inaŭguro de la ĉi-jara UK.
Pluraj landaj asocioj kaj lokaj grupoj jam aranĝis kunvenojn por esperantistoj kaj ne-esperantistoj pri komunikado kaj Esperanto. Nun estas via vico !
Uea disponigas senpage fotokopiojn de ĉiuj artikoloj aperintaj en la esperant-lingva gazetaro pri ĉi tiu temo. Por tio bonvolu kontakti :

UEA/Jubilea Jaro, Franrkijklei 140, 2000 ANTWERPEN.

----------

Klubo 100.

Ĵus kreiĝis fakta organizo "KLUBO 100" kadre de la komisiono pri la jubilea [illegible]. 100 staras por la 100-jariĝo de Esperanto. Ĝia tasko estas prizorgi la financadon de la jubilea programo. Serĉataj estas almenaŭ 100 membrojn.

Membriĝo eblas per pago de unu-foja kotizo de BF 1.000,-.
Ĝi rajtigas je : partopreno en ĉiuj kunsidoj de la jubilea komisiono
fari sugestojn kaj proponojn
voĉdonado pri la decidoj

Jen la kontnumero 034-0379435-33

La membroj estos listigitaj en niaj revuoj.

Ni antaŭdankas por via subteno.

---------------------------